

Wilhelm Busch,

Adele

*tradukita de Karl Vanselow*

*bildrakontoj - aventuroj de fraŭlo*

...

Tuj unue kun rapido  
 Pro deziro al revido  
 Serĉas Knopp vizitacele  
 La loĝejon de Adele,  
 Arda-kore, juna-aĝe  
 Ege ŝi adoras lin.  
 Ne plu vidis unu la alian.  
 Pri la vana amo sen mezuro  
 Ofte vekis penson elegian  
 Ŝia dolĉa bildo sur la muro.  
 Do demandi volas ŝin Tobias,  
 Ĉu ŝi jam alie opinias.  
 Nun ŝvitante, iom timiĝinte,  
 Kun frapanta koro alveninte  
 Ŝian pardon frapas li.  
 “Kia ega ĝojo!” vokas ŝi.  
 (Malpliigās lis ŝvito.)  
 “Venu, venu, elektito  
 De sopira mia koro!  
 Daŭre kun revid-espero  
 Mi vin tenis en memoro.  
 Prenu lokon do sur la berĵero!  
 Jes, anĝelo mia, kredu ĝin,  
 Ne direble mi amegas vin.”  
 Knopp anstataŭ amo-apetiton  
 Pente sentas novan frunto-ŝviton.  
 Jen, dum timsekundoj tiuj ĉi  
 En la ĉambro saltas hundoj tri.  
 “Helpu min!” kriegas la fraŭlin’,  
 “Karegulo mia, savu min!”  
 Ne atentinte la teruran vokon,  
 Ne atendinte ŝian pluan diron  
 Tobias forlasinte jam la lokon  
 Daŭrigas la edzin-serĉadan iron.  
 Malhelpis tiun ŝanĝon de l’ afero  
 Eĉ ne la sida loko sur “berĵero”.

*Traduko de la Germana poemo "Eine alte Flamme" de WILHELM BUSCH (\*1832-04-15 – †1908-01-09) en Esperanton de KARL VANSELOW (\*1877-03-20 – †1959-12-28).*

*Arg-1054-2139 (2014-06-19 20:01:33)*

*Tiu ĉi esperantigo troviĝas en la poem-libreto "Nia Lingvo Esperanto", eldonita de Karl Vanselow. Pri tiu vidu la retejojn [http://de.wikipedia.org/wiki/Karl\\_Vanselow](http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow) kaj [http://de.wikipedia.org/wiki/Karl\\_Vanselow](http://de.wikipedia.org/wiki/Karl_Vanselow), ankaŭ: <http://vanselow.wikispaces.com/>.*